


# LA SERBA KORO DE JOHANO



Veseleno P. Ćeletoviĉo  
(Веселин П. Џелетовић)

*Tiu ĉi dokumento enhavas nur eliraĵon el la libro, destinita por  
konatiĝo de legantoj. Ne por plua distribuado sen permeso de la  
eldoninto.*

Veseleno P. Ćeletoviĉo  
(Веселин П. Џелетовић)

LA SERBA KORO  
DE JOHANO

*Tradukis:*

Jovano Zarkoviĉo  
Ĵivanko Novakovo

*Provlegis:*

Stanislavo Belovo

*Наслов ориџинала*

СРПСКО СРЦЕ ЈОХАНОВО  
Удружење писаца Поета, 2013

*Издавач*

Удружење научних и стручних преводаца Србије

*За издавача*

Драгић Вукићевић

*Уредник*

др Милош Д. Ђурић

*Дизајн и ѿрелом*

ЈП „Службени гласник“

*Тираж*

200

ISBN

978-86-917873-3-2

*Година издања*

2023

Veseleno P. Ćeletoviĉo  
(Веселин П. Џелетовић)

# LA SERBA KORO DE JOHANO

Beogrado, 2023



**Dediĉita al ĉiuj malaperintoj kaj forkaptitoj sur  
la teritorio de Kosovo kaj Metohio**

**La aŭtoro**



## LA SERBA KORO DE JOHANO

La kvieta rigardo de Johano Vagnero ripozis sur bildo, kiu pendis kroĉita surmure. Pasantoj vidis nur homon, ĝuantan artaĵon. Lia alta frunto estis malkaŝanta intelektan personon, kaj lia belforma muskolaro vidigis, ke tio estas viro, kiu sufiĉe trejnas sin, kaj dediĉas atenton al la aspekto de sia korpo. Tre bluaj okuloj kaj krispa, fulge nigra hararo, estis allogantaj kaŝrigardojn de damoj, kiuj pasadis tra koridoro. Liaj multvaloraj vestoj, kudritaj el la plej delikataj teksaĵoj, faritaj el maloftaj lanspecoj de arktaj kaj sudamerikaj bestoj, ornamitaj per butonoj el 18-karata oro kun diamantoj, vidigis, ke li estas ano de germana supera aristokrataro. Lia kompleta nomo, pruvanta ke li apartenas al la malnova nobelaro kiu formiĝis antaŭ la 1400-a jaro, estis Johano Hanso Frederiko Teodoro Ernesto Filipino Frajero von und zu Vagnero. Plejmultaj homoj, alparolante lin, uzis la vortojn "Barono de Vagnero", sed por la amikoj li estis simple Johano. Li persiste rigardis la vintran pejzaĝon sur la bildo, kie dominis vilaĝa domo, ĉirkaŭ kiu troviĝis krommasonaĵoj kaj puto en la mezo de korto. Al latrino, kiu troviĝis proksimume kvindek metrojn for de la domo, gvidis profundaj enneĝaj piedsignoj. Rideton, aperintan sur la vizaĝo de Johano, ne igis la penso, ke iu domano ankoraŭ troviĝas ene, ĉar reiraj spuroj mankis. Li ja ekridetis rememorinte la absurdon, kiun li nun ekkonsciis - ke multega mono kiun li havas, kelkaj domoj kaj vilaoj, grandaj entreprenoj, multenombraj farmoj kaj centoj da hektaroj da tero - por li nun gravas neniom. Aŭ, alivorte, ili ne povas helpi lin. La senpoveco, kiun li sentis tiumomente, saturis lian tutan konscion. Li levis la ŝultrojn, profunde ekĝemis, leviĝis desur la seĝo, sur kiu li sidis, kaj eliris el la masonaĵo. Kiam li aperis sur strato, lia ŝoforo rapidmove saltis por malfermi al li la pordon de aŭtomobilo. Mercedeso-Benzo F700 altiris atenton de preterpasantoj - kelkaj junuloj eĉ haltis por pli bone pririgardi ĝin. Nun tio komencis ĝeni Johanon, kiu antaŭe fieris pri sia aŭtomobilo, ĉiam kaj ĉie kun plezuro parolante pri ĝi. Li al neniu permesis stiri ĝin, sed ĉi-tage li venigis ŝoforon, timante, ke la respondo, por kiu li alvenis, estos negativa, kaj ke post tio li ne kapablos stiri mem. Ĝuste tio okazis. Sidiĝinte sur la malantaŭan sidejon, li, pensodrone, ekrigardis foren, tra la fenestro de la aŭtomobilo. Kune kun stratoj zigzagis ankaŭ rememoroj kiuj Johanon revenigis al la 14-a de februaro 2000, kiam ĉio komenciĝis.

\* \* \*

Tiun lundon, same kiel ĉiam antaŭe, li estis ludanta tenison kun siaj geamikoj. Lia koramikino Greta kaj li ludis kontraŭ lia plej bona amiko Franco kaj

ties edzino Marta; aliaj amikoj observis la ludon. Falonte sur la teron, Johano ekŝrikis spasme, ankoraŭ tenante batilon en la mano. En la momento, kiam li estis klabonta volanon, li sentis teruran doloron en la regiono de sia dekstra ŝultro. Greta alkuris, levis lian kapon, kaj apogis ĝin sur sian sinon. Konvinkiĝinte, ke Johano ne perdis konscion, Franco forkuris al apuda restoracio por alporti akvon, kaj por peti restoraciistojn telefoni al helpservo. Ambulanco alvenis post kelkaj minutoj, kaj post mallongtempa esploro forveturigis Johanon en malsanulejon. La doloro ĉesis, same abrupte kiel aperis - Johano denove fartis bone. Li opiniis, ke post la esploro oni permesos al li iri hejmen. Tamen, zorgoplena rigardo de lin esplorinta doktoro, kiu studegis la observrezultojn, senkuraĝigis Johanon. Montriĝis, ke lia antaŭtimo estas kialohava, ĉar la kuracisto diris, ke li devos resti en la malsanulejo, por ke oni faru ĉiujn bezonatajn kaj detalajn esplorojn. Johano pensis, ke ili eble troigas, dezirante vidigi sian zorgon pri li, ĉar li ĝis tiam jam donis kelkajn grandajn donacojn al ĉi tiu speciala malsanulejo, en kiu li kuracis sin, kaj kiu pro altaj tarifoj havis malgrandan, sed elitan klientaron. Li esperis, ke ili tiamaniere deziras montri, ke ili zorgas pri la homoj kiuj helpas ilian laborejon. Tamen, tio estis nur espero. Post kelkaj tagoj da lacigaj esploroj kaj ekzamenoj, oni informis lin, ke li suferas je nekuracebla kormalsano. La situacion igis ankoraŭ pli tragika la fakto, ke li suferis ankaŭ je hipertrofio. La kuracistoj prognozis, ke al li restis nur unu jaro da vivo, certe ne pli ol du, do li povis nur preĝi al Dio, kaj esperi, ke aperos konvena organdonanto. Ricevinte tiun informon, li forlasis la malsanulejojn kun rekomendo pri hejma terapio.

Laŭ konsilo de sia persona kuracisto li registriĝis en Germania fondaĵo por transplantado de organoj. Johano ĝis tiam eĉ ne sciis, ke tiu fondaĵo ekzistas, sed dum sekvaj tagoj li tre bone konatiĝis kun ĝia laboro. La fondaĵo plenumadis ĉiujn formalizaĵojn, bezonatajn por donado de organoj. Ĝi, interalie transportadis organojn ĝis la operaciotoj. En ĉi tiu organizaĵo laboris preskaŭ 70 kunordigantoj, kiuj helpadis al personaro de malsanulejoj organizi donadon de organoj, sendadis provaĵojn de sango kaj histo de forpasintoj, bezonatajn por laboratoriaj esploroj, kontrolis ĉu la forpasintoj havis infektojn, tumorojn aŭ malsanojn, kiuj povus endanĝerigi la ricevonton de organo. Ĉiuj rezultoj estis sendataj al Eŭropa transplanta organizaĵo, kie speciala komputila programo komparis la informojn pri la donantoj de organoj, kun la informoj pri ĉiuj atendantoj. La ricevonto estis elektata laŭ medicinaj kriterioj. Johano ankaŭ eksciis, ke en Germanio proksimume 400 homoj jare atendas transplantadon de koro, ke li nuntempe estas la 320-a atendanto, kaj ke la koron de donanto li povos ricevi post du jaroj - se li estos bonŝanca. Sciante, ke tio estos tro malfrue, li decidis sekvi la konsilon de unu el la kunordigantoj, kun kiu li konatiĝis, pagi al homoj, kiuj okupiĝas pri la listo de donantoj, por ke ili adaptigu la medicinajn informojn pri donunto kun la liaj, kaj tiamaniere ebligi al li kiel eble plej rapidan transplantadon. Li tion faris, pagis 50.000 eŭrojn, kaj jam post du monatoj oni alvokis lin en malsanulejon por subskribi interkonsenton pri operacio. Dum li

estis proksimiĝanta al la konsultejo, lin alpaŝis nekonata virino portanta bebon en la manoj. Ĉirkaŭ ŝi saltetadis du infanoj:

„Ĉu vi estas sinjoro Johano Vagnero? - ŝi fiksrigardis lin demande.

„Jes, sinjorino. Ĉu ni konas unu la alian?“

„Ne, sinjoro Vagnero, sed Vi prenos la koron de mia edzo! – laŭtigante la voĉon, ŝi turnis sin al li, kaj ripetis, nun jam kriante - Vi prenos la koron de mia edzo!“

Johanon konsternis ĉi tiuj ŝiaj vortoj, ĉar li sciis, ke nur la kunordigantoj scias kiu estas ricevonto de organoj, kaj ke la parencoj de la forpasinto ne scias la identecon de ricevonto. Li ekpensis, ke ĉi tiu virino eble deziras ricevi monkompenson. Se temas pri tio, li volonte pagos al ŝi - mono ne estis lia problemo.

„Kara sinjorino, mi tre bedaŭras pro via perdo, sed se via forpasinta edzo decidis esti donanto de organoj, mi ne vidas ian ajn problemon. Kompreneble, se vi opinias ke mi devas pagi por la koro...“

„Fiaĉulo, - interrompis lin la virino, ne permesinte al li fini la frazon, nun jam per histeria voĉo - vi opinias ke vi ĉion povas aĉeti. Mia edzo estas viva, li ja estis ricevonta la koron, kiun prenos vi, ĉar vi, la kanajlo, subaĉetis la decidantojn,, kiuj tion organizas. Pro vi miaj infanoj estos orfoj, vi ja malrespektas fremdan suferon kaj malriĉecon; estu malbenita, vi, kium kiu ekstervice ricevos tiun koron!“

Ŝi forturniĝis kaj ekiris al la elirejo de la malsanulejo. La infanoj ekkuris post ŝi. Neniam Johano vidis iun tiom digna kaj estiminda, kiel tiu foriranta virino. Same, li neniam en la vivo estis hontigita kiel nun. Enirinte la konsultejon, li demandis kuraciston, kiu alvokis lin, kiu estas sekva en la listo, ĉar li volas al tiu homo transdoni sian lokon en la vico. Li ricevis informon, ke temas pri edzin hava viro, patro de tri infanoj – do, tio estis la homo, kies edzinon li renkontis. Nenia konvinkado de la kuracisto sukcesis ŝanĝi lian decidon rezigni la transplanton. Lin ne hezitis eĉ la fakto, ke post tia decido li sendube estos la lasta paciento sur la listo de atendantoj. Longan tempon post ĉi tio li pasigis sidante sur benko en la atendejo. Vidalvide sidis juna virino, kun anĝelvizaĝa filineto. La infano havis proksimume sep aŭ ok jarojn. Vidinte lian malgajan vizaĝon, la knabineto, leviĝinte desur la seĝo, sur kiu ŝi sidis, alpaŝis Johanon.

„Oĉjo, kial vi estas tiel malgaja? Ĉu ankaŭ via reno ne funkcias, same kiel la mia?“ - infansincere demandis la knabineto, rigardante lin rekte en la okulojn. Johano tenere ekkaresis ŝian kapon. La patrino, kiu observis la scenon, komencis plori. Ŝi diris al Johano, ke ŝi komprenas, kiel li fartas, supozante ke li, samkiel ili, ne havas monon por pagi operacion, ke ilia sorto estas la sama. Ŝi ne sciis kiom ŝi eraras. Je ŝia miro, la sinjoro demandis kiaj estas ŝiaj propra kaj familia nomoj, kia estas la prezo de operacio kaj ĉiuj elspezoj, bezonataj por transplantado renon al la knabineto. Ŝi ankoraŭ pli ekmiris, ricevinte ĉekon je 100.000 dolaroj, kun ŝia propra kaj familia nomoj, kiun al ŝi donis la filineto, kiam la sinjoro jam estis foririnta.

„Panjo, la oĉjo diris, ke almenaŭ mi estu feliĉa, se ja ne povas li. Kaj ke mi donu al vi ĉi tiun papereton“.

Kelkajn tagojn post tiu okazaĵo Johano pasigis meditante kion fari. Li evitadis amikojn, eĉ al Greta li diris, ke li estas okupata, ke li nun ne povas kun ŝi rekontiĝadi pro laboraj farenadaĵoj. Al neniu, ankaŭ al ŝi, li volis diri la kompletankompletan veron. Ŝi komprenis, ke okazas io stranga, kelkajn fojojn ŝi provis trude renkontiĝi kun li, sed post lia persista rifuzado, ŝi rezignis, kaj decidis portempe lasi lin sola, ĉar estis evidente ke li tion bezonas. Ŝi esperis, ke ĉio baldaŭ estos kiel iam - ĉar la tempopaso ĉiujn problemojn solvas. Tamen, ĝi alportis novajn defiojn al Johano, kiu tutajn tagojn promenadis kaj meditis pri sia malfavora sorto. Telefona voko de lia doktoro kun postulo, ke li urĝe venu en malsanulejon, denove maltrankviligis la vivon de Johano. Li ne sciis, pro kio la doktoro venigas lin, tial li, alvokinte sian ŝoforon, ordonis al tiu veturigi lin al la malsanulejo. De la doktoro li eksciis, ke liaj rezultoj malboniĝis, ke al li restis ne pli ol kvar monatoj da vivo. Frakasita de malĝojo, Johano, dum reveno hejmen, sidante sur la malantaŭa sidejo de sia Mercedeso-Benzo F700, faris definitivan decidon. La mallongan restintan parton de sia vivo li dediĉos al veturado tra la mondo - al amuzoj. Se lia grandega riĉo, valoranta pli ol tricent milionoj da eŭroj, ne povas helpi al li, ĝi almenaŭ la lastajn monatojn de lia vivo faru neforgeseblaj. Ĝis tiu momento, pro laboraj farenadaĵoj Johano jam delonge nek ripozis, nek distriĝis. Li decidis kunvojaĝigi sian amikon Hanson, kiu same kiel li ne estis edziĝinta, por ke ili povu senĝene ĝui kaj amuziĝi. Antaŭ la komenco de sia libertempo, li skribis testamenton, kun ordono malfermi ĝin nur post lia morto, aŭ unu jaron post lia malapero. Li interkonsentis kun Hanso, ke la unua urbo, en kiu komenciĝos ilia distriĝo, estos Romo. La eterna urbo atendis ilian alvenon... same kiel lia sorto...

\* \* \*

La privata flugmaŝino, posedaĵo de Johano Vagnero, surteriĝis tiun majan tagon de la 2000-a jaro sur la flughaveno „Romo-Urbo“, kiu troviĝis nur ses kilometrojn for de la urbocentro. Johano ordonis al la piloto post tri tagoj reveni kaj forflugigi ilin. Al la hotelo „Westin Excelsior“, en kiu Johano luis apartamenton „Villa La Cupola“, en kiu unutaga restado kostis 14950 dolarojn ili venigis taksio. La apartamento havis du dormejojn. Vitraloj en la vivoĉambro bildigis detalojn el mitologio, kombinitajn kun modernaĵoj. La apartamento havis ankaŭ propran kuirejon kaj manĝejon kun lustroj el “murana” vitro, en la formo de antikva mozaiko, vinan kabineton, propran kinejon, kaj ankaŭ propran lifton, per kiu la gasto povis veni en gimnastikejon aŭ banejon. Hanso ne povis kredi al propraj okuloj, vidinte en kia luksejo li troviĝas. Li senpacience atendis veturi en la urbon, ĉar la taksiisto rakontis al ili pri tieaj noktaj frenezigaj amuzejoj. Johano eksentis bezonon telefoni al Greta, kundividi kun ŝi siajn pensojn, adiaŭi ŝin, tial li petis Hanson atendi lin apud la akceptejo, ĝis kiam li finos sian privatan interparolon. Per tremantaj manoj li elektis ŝian telefonnumeron.

„Halo...!“ - aŭdiĝis ŝia rava voĉo, kiu devigis Johanon paŭzeti.

„Amata mia, pardonu, ke mi ĉi-maniere adiaŭas vin. Mi nur deziras diri, ke mi vin amis kaj amas senlime, tutkore kaj tutanime. Ni, bedaŭrinde, neniam plu vidos unu la alian, ĉar la sorto tiel volas. Mi ne volis kunvojaĝigi vin, ĉar mi ne volas, ke eĉ unu momento de via vivo pasu vane. Al mi restis ankoraŭ du-tri monatoj da vivo, kaj se ni pasigus ilin kune, tio estus nepardonebla eraro, nepardonebla rilate al vi. Mi deziras al vi ĉion la plej bonan en via vivo, vi trovu viron, indan esti kun vi, kaj realigu kun li ĉion, kion ni planis. Mi jam skribis testamenton, vi estas unu el la heredontoj, do, vi ne devas zorgi pri la estonteco, almenaŭ koncerne la monon. La testamento estos malfermita post mia morto, aŭ unu jaron post mia malapero. Mi amas vin neeldireble, ĝuste pro tio mi deziras, ke vi forgesu min kiel eble plej rapide.

„Sed, Johano...“ - la sono de interrompita kontakto, same kiel la vortoj, kiujn diris Johano, turmentis Gretan dum multaj tagoj. Plej malbone estis, ke Johano uzis poŝtelefonon, pro kio ŝi ne povis ekscii, kie li troviĝas. Al ŝi restis nur atendi, esperi kaj ĉagreni. Tamen, io al ŝi sugestis, ke ŝi neniam plu vidos lin.

Johano kaj Hanso eliris el la gastejo kaj sidiĝis en taksion. Al la ŝoforo ili ordonis veturigi ilin al la adreso Via Velletri 13, kie troviĝas la fama diskejo „Alieno“. Ili ekscitite interparolis kaj observis la stratojn, kiujn ili estis traveturantaj, pro kio ili ne rimarkis, ke ilin sekvas aŭtomobilo. Ili ankaŭ ne rimarkis, ke malantaŭ ili en la klubon eniris du viroj el tiu aŭto. La fakton, ke tio estis travestitoj, neniu rimarkis, ĉar en Romo ĉio estas normala. Tiun nokton Johano kaj Hanso neniam forgesos. Tamen, ili ne memoros ĝin pro admirindaj knabinoj, kun kiuj ili dancis - kaj pro freneza tempopasado, kiu daŭris kelkajn horojn, kaj pro tio, ke ili vekiĝis en kelo, ligitaj. Ili memoris ĉion, kio estis okazanta, ĝis la momento, kiam ili fortrinkis senpagan drinkaĵon, kiun al ili alportis korkonkera blondulino. En la drinkaĵon verŝajne estis metita narkotaĵo, ĉar post tio ili memoris nur, ke la travestitoj „helpis“ al ili eniri ilian aŭtombilon, parolante en perfekta germana lingvo, kaj veturigis ilin al ilia hotelo. Post tio en ilia memoro ĉio iĝis obskura kaj malluma. Ankaŭ nun, vekiĝinte, ili vidis nenion, ĉar ili havis blindigan tukon sur la okuloj, kaj la buŝojn ŝtopitaj. Iliaj brakoj kaj kruroj estis ligitaj. En la aero sentiĝis mucido kaj humideco, kio supozigis, ke ili troviĝas en kelo. Post unu-du horoj ili aŭdis la pordon malfermiĝanta. Iu alparolis ilin germanlingve, per kruda vira voĉo:

„Kiu inter vi estas barono Wagnero?“.

Johano kapsignis. Li sentis, ke oni demetas la blindigan tukon desur liaj okuloj. Kiam liaj okuloj iom alkutimiĝis al la obskuro, li rimarkis, ke en la kelo, krom li kaj Hanso, troviĝas ankoraŭ tri maskitaj personoj, kiuj surhavis kapuĉojn, por ke oni ne povu rekoni ilin. evidente temis pri forkapto, kaj Johano tuj komprenis, ke la homoj ĝuste pro tio maskiĝis kiel travestitoj - por ke neniu el la diskejo povu priskribi ilin.

„Sinjoro barono, mi esperas, ke vi komprenis, ke vi estas forkaptitaj, kaj ke por via liberigo ni devos ricevi elaĉeton. Ni esperas, ke vi kunlaboros, kaj ke

ni ne devos uzi fizikan mistraktadon - la minaca voĉo resonis en la kelo - se vi estas preta kunlabori, kapjesu, kaj mi forigos la tukon el via buŝo. Se vi provos krei, sciu ke vin neniu aŭdos, sed tio kaŭzos al vi novajn malagrablejaĵojn..."

Johano kapjesis. Post tio al li proksimiĝis viro, aŭ ino, li ja ne povis scii, ĉu iu inter ili estas virino, kaj eligis la tukon el lia buŝo.

„Bone, sinjoroj, sed mi petas vin demeti ankaŭ la tukon de mia amiko. Mi promesas, ke ankaŭ li silentos.”

La maskito alrigardis la estron, atendente signon de aprobo. La estro kapjesis, kaj ili demetis ankaŭ la tukon de Hanso.

„Karaj sinjoroj, se viaj postuloj estos netroaj - diris Johano tuj, antaŭ ol ili alparolis lin - mi nepre plenumos ilin. Se mi povas pagi la sumon, kiun vi petas, mi tuj diros tion al vi. Se la sumo estas pli granda ol tio, kion mi havas - mi tion simple ne povos fari, ĉar mi estas la lasta posteulo de mia familio, tial mi de neniu povas pruntepreni monon“.

„Sinjoro barono, ordonu ke oni pretigu kvin milionojn da eŭroj, kaj konsideru vin libera. Ĝuste pro tio ni estas maskitaj - ke via sekureco ne estu en danĝero, ĉar vi ne povos rekoni nin” - senhezite respondis la ĉefa forkaptisto.

„Estas videble, ke vi estas malamatoroj. Unue - laŭ la maniero, kiel vi informiĝis, kiu mi estas, due - ĉar vi scias la precizan sumon, pri kiu mi disponas. Sinjoroj, konsideru, ke ni interkonsentis. Al Hanso, kiam li informos min, ke li venis en Germanion, mi donos instrukciojn, kie kaj kiel li prenu la monon. Vi poste kun li interkonsentu pri loko kaj kondiĉoj, kie kaj kiel preni la monon, post kio vi liberigos min. Mi esperas, ke vi estas honestuloj, ke vi la interkonsenton plenumos. Mi vidas, ke vi forprenis miajn poŝtelefonojn. Nu, vi aĉetu novan poŝtelefonon, por ne timi kaŝaŭskultadon, pri ĝia numero informu Hanson, post du tagoj, la tempon vi interkonsentu kun li. Por tio vi povos uzi mian labortelefonon. Vi, Hanso, atendu en la firmao. Kiam mi vidos, ke vi telefonas el la kancelario, mi scios, ke vi estas sekura, tiam mi diros al vi, kiu havigos al vi la monon. Poste vi interkonsentu, kiel organizi la transdonon de la mono. Ĉu vi konsentas pri ĉi tio, sinjoroj?“

„Kompreneble, sinjoro barono - en la voĉo de la forkaptisto sentiĝis kontento; li evidente ne atendis, ke ĉio iros tiel glate - ni faros kion vi proponis. Vi, Numero Du - li turniĝis al la homo, staranta apude, evidente uzante ĉifran nomon - liberigu sinjoron Hanson, irigu lin al la subtera enirejo, kaj liberigu lin. Viaj dokumentoj estas ĉi tie - li donis al Hanso lian pasporton - prenu ankaŭ monon, ĝi ja estas via, por pagi taksion kaj aviobileton. Ĉu vi pagis la apartamenton en la hotelo?“ - demandis la ĉefo Johanon, kontrolante ĉu hotelistoj informos la policon pri ilia malapero.

„Jes, sinjoro, la hotelo ricevis monon por tritaga restado, ni ja planis tiom esti en Romo. Hanso, mi petas vin, temas ja pri mia vivo, neniel informu pri ĉi tio la policon. Nek ĉi tie, nek en Germanio. Mi esperas, ke vi komprenas, ke nun ĉio dependas de vi. Precipe estas grave, ke vi plenumu miajn instrukciojn, kiam vi estos en Germanio. Adiaŭ amiko mia.”